

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Esperanto-Muzeo

EL NIA MUZEO



Jokohama

— kio estis, kiel estas en Esperanto-Muzeo Jokohama —

Libraro oferita de la familiano

Lastatempe nia Muzeo danke ricevis, kaj plu ricevos librojn, kiujn familiano de esperantisto vivinta en la 20a jarcento oferis al ni – la nomo de la esperantisto restas anonima laŭ la volo de la familiano. Ĝis la 2a de majo alvenis dek skatoloj, kaj preskaŭ samkvante alvenos poste. La familiano unue direktis sin al Japana Esperanto-Instituto, kiu respondis neebulon akcepti la libraron, kaj laŭ rekomendo de JEI, nia muzeo estis elektita.

Jam pluraj volontuloj el niaj membroj ekfaris kartojn bibliografiajn pri la ricevitaj libroj, kaj ili estos poste katalogitaj.

Nia libraro utilis al faka esplorado

Jam menciite en nia januara n-ro 370, s-ino Kamimura Kazumi, vicprofesoro de la Universitato Josai [zyoosai] utiligis dokumentojn stokitajn en nia muzeo, faris fakan raporton en marto: nome en *Association for Asian Studies* (Asocio de Aziaj Studoj), ŝi raportis pri “*Proletarian Esperanto Movement in the Age of Oppression and Political Conversion*” (Proleta Esperanto-Movado en la erao de kontraŭpremado kaj de politika konvertiĝo). Nome, nia librostoko inkluzivis dokumenton pri Esperanto-movado en 1930aj jaroj. Cetere, ŝi prelegos en la Japana Esperanto-Kongreso ĉi-jare okazonta septembre en la urbo Hachioji [haĉioozi], pri la rilataj temoj.

Aida Yayoi omaĝita de Pola Radio

En la rubriko “El la Esperanto-Gazetaro” en la elsendo de la Pola Retradio je la 22a de marto 2022, oni prezentis la decembran numeron de La Revuo Orienta de JEI en 2021, kaj interalie Barbara Pietrzak komentis jene:

“Nur nun pere de ĝi ni eksciis pri la forpaso de nia aktiva siatempe aŭskultantino Aida Yayoi. En niaj koroj – aparte de Gabi kaj mi – restas niaj renkontiĝoj en Jokohamo, kie Gabi dum la UK estis la gasto de ges-roj Aida, kaj poste ni kore rememoras niajn renkontiĝojn en Varsovio.

La periodaĵo de Japana E-Instituto prezentas plenmanon da esperantigitaj de Aida Yayoi utaoj de Wakayama Bokusui. Ni citu unu el ili memoromaĝe al kara Yayoi-san:

Du nuboj kuniĝontaj
dividiĝis denove kaj malaperis foren
restas la blua ĉielo printempa.

(el https://pola-retradio.org/2022/03/el-la-e-gazetaro_22-03-2022)

“La Ŝtona Urbo” komune legita

Ni anoj de Jokohama Salono en nia rondo komune legis la libron “La Ŝtona Urbo” de Anna Löwenstein dum tri jaroj. Kaj en la lasta aprilo ni finfine tralegis ĝin. Jen estas nia konciza impresio.

Sopire al la Arbara Vilaĝo

Sibayama Zyun’iti

Legante la postan parton de la romano, oni scias, ke temas pri la antaŭa duono de la unua jarcento, kaj la rakontanto, nome “mi” estas kelta virino Bivana (poste renomata kiel Barbara en romia tempo).

Kiel knabino, Bivana plene ĝuas la vivon en kabano ĉirkaŭita de herbejo kaj arbaro, irante ĉerpi akvon ĉe rivero. Ŝi aŭdas kion gepatroj kaj aliaj plenkreskuloj rakontas pri bataloj, venkoj kaj malvenkoj, sed ili ŝajnas esti nur fantaziaj rakontoj, kaj al Bivana kaj al ni legantoj. Estas priskribo de bizaraj religiaj oferadoj de vivo, kion ni opinias barbaraj. Sed kiam oni legas, kion romiaj soldatoj faris al la venkita popolo, aŭ Neroaj regantoj faris al la fruaj kristanoj, ni komprenas, ke la ŝajne barbaraj aferoj en la kelta socio estas pli humanaj ol la romianoj...

Fare de romiaj soldatoj, la vilaĝanoj, familianoj de Bivana estis mortigitaj, Bivana kaj aliaj virinoj ĉenligite sur ŝipo estas sendataj al Romo, Bivana estas vendita kiel sklavo al riĉula familio en vilaĝo iom for de Romo. Nu, ĉu nur malfeliĉo falas sur ŝin, je la unua triono de pli ol 300-paĝa libro? Ne! La vivo en la vilao de riĉulo-liberulo, kie kunvivas multaj sklavoj, virinaj kaj viraj, estas iel paca, kvankam ŝi (nun nomata Barbara) ĉiam sopiras al la arbara vilaĝo.

Barbara poste estis edzinigita al iom altranga sklavo, fare de la vilaestro, sen speciala amo al la novedzo, sed la vivo iel turniĝas, kaj ili fine liberiĝas, do jam ne estas sklavoj, kaj kun filo kaj filino loĝas en Romo, fakte ŝtona urbo. Sed la edzo iom, kaj la filo multege inklinas al “nazaretanoj”, kion hodiaŭ ni konas kiel fruaj kristanoj. Kaj la historia fakto, nome la incendio de la urbo Romo, kaj falsa akuzo al la nazaretanoj, kiuj estis suspektitaj ekbruligi la urbon okazis... La falsigado nun imagigas al mi la falsigadon de la kulpo al ukrainianoj fare de la rusa registaro...

Tiel la romano, verkita de britino edziniĝinta al italo (rom-urbano), rakontas detalege socion ege foran de la nuno, sed kun la urba-vilaĝa problemo aŭ fals-informa problemo kio hodiaŭ aktuala estas.

Impreso pri “La Ŝtona Urbo”

Mizro Iwaya

Ni en Jokohama Salono finis legi la titolitan libron en tri jaroj. Mi ne spertis legi unu libron tiel detale. Antaŭ ĉio mi volas diri ke tiu ĉi libro estas samtempe interesa kaj facila. La verko estas vivo de iu knabino, kiu estis naskita en Britanio kaj transportita al Romo kiam Roma Imperio konkeris Britanion en la unua jarcento. Certe la aŭtoro multe studis pri historiaj faktoj ĉirkaŭ tiu tempo ĉar ŝia priskribo estas detala kaj vigla.

Mi ne bone scias antikvan moron de tiuj landoj. Kelkaj epizodoj, ekzemple, ke kelta beltano oferis junulon kiel martiron al dio, sufiĉe okulfrapis min. Sed rekonsiderante, mi trovis alian ekzemplon ke rusa muzikisto Stravinski komponis “La Riton de la Printempo” kun la sama temo. Tio certe ne estis malofta okazaĵo en la antikva mondo.

Kiam la ĉefheroino venis al Romo, ŝi estis sklavo, kiu servis al granda farma familio. Ŝi estis feliĉa malgraŭ la sklaveco en tiu situacio ĉar ŝi vivis normalan vivon. Kelkaj ŝiaj kolegoj suferis pli mizeran vivon. Poste ŝi akiris roman civitanecon. Sed kiam ŝia filo kreskis plenaĝa junulo, okazis tragedio; t.e. incendio de Romo sekvata de subpremo al kristanoj/nazaretanoj kio pereigis ŝian filon. Laste ni legantoj konsciiĝis ke tio estas la ĉefa temo de la aŭtoro.

Mi aŭdis ke la libro vendiĝas bone. Ni kutime vidas ke Esperantaj libroj ne vendiĝas bone kaj ties unua eldono restas sur la breto dekon da jaroj. Sed tiu ĉi libro nombras jam la kvinan eldonon. Mi komprenas tion ĉar ĝi estas interesa kaj facila, tial rekomendinda al ĉiuj.

Finleginte la romanon

“La Ŝtona Urbo”

SIBAYAMA Noriko

Nia Esperanta lernogrupa “Jokohama Salono” komune legas libron dufoje en unu monato. Antaŭ tri jaroj ni eklegis la romanon “La Ŝtona Urbo”, kaj finlegis antaŭsemajne (2022-04-02). La romano priskribas vivon de unu virino, kiu naskiĝis en vilaĝo (en nuna Britio) ĉirkaŭata de kampo kaj herbejo. En antaŭa parto de la

romano, aperas multaj epizodoj de infanaĝo de la virino nomata Bivana. Ŝi vivas feliĉan vivon kun siaj familianoj kaj geamikoj. Sed post ŝia fianĉiniĝo (supozeble ŝi estas ĉ. 14-jara) subite atakas la vilaĝon roma armeo, kaj ŝi estas forkondukita al Romo per ŝipo.

Vidinte la konstruaĵojn en Romo ŝi pensis, ke ĝi estas ŝtona urbo. La titolo de la romano devenas de tio.

Min ne tre interesis la antaŭa duono (vivo en vilaĝo), sed roma parto iom post iom ekscitis min, ĉar en Romo vivo de Bivana draste ŝanĝiĝas. Unue ŝi estas vendita kiel sklavo. Ŝi estas nomata Barbara. Ŝi edziniĝas al sklavo Filono kaj naskas bebojn, kaj ...

Unue mi admiris la talenton de la aŭtorino Anna Lövenstein, kiu priskribis ĉion ege detale kvazaŭ ŝi mem vidis kaj spertis. Plie tre multaj homoj aperas en la romano. Kredeble en ŝia kapo ĉiu rolulo klare vidiĝas, tamen leganto iom embarasiĝas. Pro tio listo de (preskaŭ) ĉiuj roluloj farita de s-ino Murata Kazuyo ege helpis min. Dankon Murata-san.

Mi kredis, ke sklavo laboras trudite, eĉ vipite, sen ripozo. Sed en la romano iuj sklavoj vizitas lernejon, iuj havas sufiĉan monon, kaj per la mono eĉ sklavoj mem povas elaĉeti sklavecon. Ni salonanoj opiniis, ke tiama sklavo similas al nuna salajrulo. Ordinare ili vivis ne tre severe kiel ni supozas.

Al mi estis interese, ke sklavoj anasvice vizitadis publikan banejon kiu similas al nuna amuzejo-banejo.

La protagonisto Bivana (poste Barbara) ne ŝatis la vivon en la ŝtona urbo kaj ĉiam sopiris vilaĝon kaj herbejon. Kompare al ŝi, mi mem nun vivas en ŝtona urbo: mi loĝas en ŝtona apartamento sen ĝardeno sen hejmaj plantoj. Mi mem ne spertis vivi en kamparo, do mi ne sopiras herbejon, sed mi povas simpatii al ŝi. Mi kontentiĝas per la (ne tute) feliĉa fino.

Mi ĝojas ke mi finlegis tiom longan romanon. Se komuna legado ne estus, mi ne finlegus ĝin, ĉar komenca parto preskaŭ ne interesis min. Estus pli bonvene, se klarigaj ilustraĵoj kaj mapoj vidiĝus en taŭgaj paĝoj.

JOKOHAMO PLI NOVA (4)

SIBAYAMA Zyun'iti

Solidare kun Ukrainio

Kiel Doi Ĉieko skribis en la marta n-ro 272, nia havenurbo Jokohama havas ĝemelan rilaton kun la havenurbo Odeso en Ukrainio de 1965, kaj la urbo entreprenas solidarecan helpon al la militosuferanta Ukrainio. Monkolektado komenciĝis je la 10a de marto, daŭros ĝis la 10a de junio, kaj la mono iros al la Ukraina Ruĝa Kruco.

De la 28a de aprilo ĝis la 29a de majo, okazas "Foto-ekspozicio Nian Penson al Odeso" en la Jokohama Muzeo de Eŭr-Aziaj Kulturoj (en Jokohamo), en kiu pacaj scenoj de Odeso estas vaste montritaj al la publiko. Tiu Muzeo mem estis malfermita en 2013, kun la celo montri vaste la kulturon de Eŭropo kaj de Azio, kiuj kune formas Eŭrazion.

La kanto-grupo *Yokohama Sisters* (= Jokohamaj Fratinoj), kantis ukrainlingve ukrainan antemon "Ukrainio ne pereos", kaj disvastigis per jutubo:

<https://www.youtube.com/watch?v=pJFU-soDQGA>.

La kanto ricevis eĥon ankaŭ de ukrainaj loĝantoj.


Tiu grupo kantis esperantigitajn kantojn pri Jokohamo okaze de la 104a Japana Esperanto-Kongreso, novembre en 2017.

Por nova Havendistrikto Jamaŝita

Estas raportite en n-ro 346, ke eventuale kazino estos enkondukita en Jokohamon, precipe en la Havendistrikto Jamaŝita (proksime de la Parko Jamaŝita). En n-ro 368, kazino estis neita de la nova urbestro. Sed la distrikto restas re-evoluigenda. Ĝi estis kargo-centro, sed kargoj jam havas pli vastan import/eskportejon aliloke. Tial la Urbo Jokohamo komencis revivigi la distrikton en pli homplenan, vizitindan turismejon, ĝis la jaro 2030.

Eseo

Duolingo estas bona ekzemplo de “Ludigado” (*Gamification*)



NAMBA Fumiharu

En la esperantujo famiĝis lastatempe nova lernometodo “Duolingo”. Ĝi estas komputila eduka sistemo inkluzive de aplikaĵo por saĝtelefonoj kaj retejo por personaj komputiloj. Multaj uzantoj ŝatas tiun lernadon interese kaj opinias kiel “ĝuante lerneblas same kiel videoludoj”. Ja, ankaŭ mi konsentas kaj ĝuas lernadon de diversaj lingvoj ĉiutage kvazaŭ la sistemo estas amuza ludaplikaĵo. Tamen, kio estas la esenco de “same kiel videoludoj”?

Lastajare, mi trovis interesajn artikolojn en Vikipedio, t.e. “Gamification” en la angla versio^(*). Tradukinte ilin en Esperanto, mi prezentis tiun temon en mia kurso. Tiuj titoloj estus eble... “Ludifikado” aŭ “Ludigado” en nia lingvo. En la artikolo oni klarigis “oni utiligas faktorojn de desegno por ludoj, kaj principojn de ludoj, por aferoj aliaj ol ludoj”. Nu, iom malfacile por kompreni kaj traduki... Tamen, pensante pri la “principoj de ludoj”, tiu koncepto estas ne tre malfacila.

Dekomence, homoj havas diversajn ekdezirojn, ne nur fizikajn (manĝi, dormi, ktp.) sed ankaŭ “sociajn”. Ni volas venki aliajn, volas kolekti iujn aĵojn aŭ monon, volas ricevi laŭdon kaj gratulon de aliaj homoj, volas eniri iun ajn grupon kaj senti unuecon de la grupo,

volas stari sur alta stato en la grupo, ktp., ktp. Videoludoj havas jam longan, kelkdekjaran historion, kaj sufiĉe kreskigis teknikojn stimuli tiajn ekdezirojn. Rememoru ekzemplojn. Preskaŭ ĉiuj videoludoj havas regulon de “poentoj” kiujn la ludantoj volonte kolektas. Cetere, en multaj videoludoj la ludantoj konkuras kaj eĉ batalas kun aliaj ludantoj. Krome, la ludanto povas eniri propran teamon, kiu kunlaborante konkeras al aliaj teamoj. Vidpunkte de “sociaj ekdeziroj”, tiuj ĉiuj estas bonaj sistemoj stimuli la sociajn dezirojn de homoj.

Se vi jam uzas Duolingo, vi nepre povas trovi samajn faktorojn en tiu “ludigita” lernometodo. Jen estas poento-sistemo “XP”, jen estas konkerejo “League”(Ligo), jen estas en-luda monero “Gem”(gemo) kiun ludanto gajnas post lernado. Vi povas registri “amikojn” kun aliaj ludantoj, kaj kiam vi atingas iun mejlŝtonon en kurso vi ricevas gratulojn de la amikoj (fakte, la amikoj nur puŝis butonon “Gratulu” rekomendite de la programo!). Ĉiuj estas desegnitaj kaj instalitaj por viaj sociaj deziroj. Ja, ĝi estas la esenco de “same kiel videoludoj”.

Nun, ĉu ni ankaŭ povus utiligi tiun “Ludigadon” por nia agado en la Esperantomovado?

(*) en la japana : ゲームフィクション

3ZZZ legis niajn artikolojn

(24a de januaro – 2a de majo, 2022)

elsendo de la 24a de januaro 2022

el Novaĵoj Tamtamas numero 370; “La knaboj de Jakoo” de Tanigaŭa Hiroŝi

elsendo de la 14a de februaro 2022

el Novaĵoj Tamtamas numero 370; “Sub la pandemio” de Hirai Isako

elsendo de la 2a de majo 2022

el Novaĵoj Tamtamas numero 373; “Se vi nokte tondas viajn ungojn” de Hirai Isako